Programo de UEA:

Lomeo, Togolando, 23-25 decembro 2021, ekde 14:00 UTC

# Esperanto per io; io per Esperanto

Enkonduko al la seminario de Stefan MacGill:

La kongreso okazas kadre de la togolanda kongreso

Universala Esperanto-Asocio

# Esperanto per kio? (1)

Kiel aliri la lingvon tra Afriko? Ekzistas variaj ebloj:

- En multaj landoj ekzistas lokaj kluboj kun kursoj
- En pluraj landoj ekzistas Eo-Centroj, kun kursoj
- La Afrika Komisiono aktive konigas la lingvon tra universitataj rondoj
- Retkursoj kreskas pere de la angla, franca, svahila kaj pliaj lingvoj.
- Ekzistas vortaroj inter Eo kaj diversaj afrikaj lingvoj.

# Esperanto per kio? (2)

- Virinaj grupoj en kelkaj landoj (Madagaskaro kaj aliaj)
- Internaciaj kon-gresoj de ILEI kaj TEJO (esperelble baldaŭ UEA)



- Kunlaboro inter landaj asocioj tra la kontinento

# Kio per Esperanto (1)

- Tra la kontinento estas elstara kaj forta deziro ligi Esperanton kun aliaj projektoj kaj terenoj.
- La ligo kun instruado estas evidenta; ofte temas pri pli ol nur la kurshoro.
- Ekzemple, la ĵus okaz-inta Zamenhofa festo en infanĝardeno en Burundo, kie ĉefrolis festa manĝo por la infanoj.




- Pro la vasta uzado de poŝtelefonoj, gravegas, ke kursoj estu per tiuj telefonoj spekteblaj kaj aŭdeblaj.

# Kio per Esperanto (2)

- La virinaj grupoj ligas la lingvon kun virinaj rajtoj.
- Estas evidenta ligo inter Esperantismo kaj evoluo: tion mi mem persone spertis en la 6a Afrika Kongreso en Bunda, Tanzanio, kie la lokaj instancoj volonte salutis, sed havis esperojn, kiujn la movado apenaŭ povis plenumi.



Foto: SMG

# Kio per Esperanto (3) Specifa ekzemplo




- Klara ekzemplo estas la 4-vilaĝa setlejo Marambeka.
- Ili prizorgas la lernejon Zamenhof, kie en 2016 mi estis invitita planti arbon.



# Marambeka – arbo-plantado



# Marambeka plie

- Tiu alt-lernejo aktive laboras por doni plian sekurecon al siaj junulinaj studentoj.
- Tra la vilaĝoj estas memstaraj projektoj por krei la propran elektron el lokaj fontoj.
- Tiuj projektoj havas aktivan subtenon el pluraj aliaj landoj, ekzemple Nederalndo, Germanio kaj Francio.

# ACE – nova partnero por AMO

- Nia nuna partnero ACE funk- ciigas de jaroj lern- ejon kun ekzamenoj kaj abunda internacia raportado.



# Kio per Esperanto? (5). Internacia kunlaboro

- Ekologiaj movadoj kunlaboras, ekzemple EVA kaj la iniciato en Berlino kaj aliaj helpas pri la instalado de sun-paneloj.
- Nia faka asocio pri komerco kaj ekonomia evoluigo (IKEF) ĝuas rapidan kreskon tra la kontinento, kie progreso ofte okazas pro la entreprenemo ĉe unuopuloj.

IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio

# Internacia Kunlaboro

- ILEI kaj <edukado.net> pioniris la enkon-dukon de reta trejnado, ĉu ĝenerale, ĉu per la defia instruista kursaro (40% el ĉiuj sukcesoj okazis en Afriko).



# Rekomendoj kaj deziroj

La Landa Asocio estu en Eburbordo restarigita.
La Afrika Komisiono ludu gravegan rolon en la strebo akcepti la unuan Afrikan Universalan Kongreson.
Intensigita penetro de pliaj fakaj asocioj tra la kontinento:

- **IFEF**: Pluraj landoj havas evoluigajn fervojajn sistemojn, ie devas esti fervojistoj, kiuj parolas Esperanton.
- **UMEA**: Kelkaj afrikaj landoj montris sian mondgvidan kapablon pri la trovo de la Kovid-variaĵo Omikron. UMEA povas agi tra Afriko.
- **LIBE**: Blinduloj certe ekzistas tra Afriko. Tion atestas la siatempa projekto "Agado E3" el la 70aj jaroj de la antaŭa jarcento. LIBE kaj UMEA organizu ion!
- **Muziko**: Afriko povas fari elstaran kontribuon; partneroj estus Eurokka kaj similaj.